

KATOLIKA Sento

Periodico dell'Unione Esperantista Cattolica Italiana (UECI)

www.ueci.it

"Per la promozione della fratellanza e della comprensione tra i vari popoli di diverse lingue" (Paolo VI)

Periodico bimestrale - Reg. trib. di Vercelli 22.12.1997 n. 306 -
Sped. in abb.post. art. 2 comma 20/c L662/96 - filiale di Vercelli -
Direttore resp.: Mons. Gianni Ambrosio - Dir. e amm.: Vercelli, via Benadir, 62

Anno 98 - n. 2
2019

GIOVANNI DAMINELLI

**Il presidente IKUE e UECI
Giovanni Daminelli
ci ha lasciati**

**La prezidanto IKUE kaj
UECI Giovanni Daminelli
forlasis nin**

Il nostro amato presidente è morto all'età di 75 anni il 26 marzo 2019 a Sesto San Giovanni, la città dove abitava. Una terribile e fulminea malattia l'ha portato via dopo solo cinque settimane dalla sua scoperta.

Giovanni Daminelli era nato a Bergamo il 2 di agosto del 1943, primo di quattro figli. Egli si diplomò come elettrotecnico all'istituto industriale "P. Paleocapa" di Bergamo.



Nia amata prezidanto mortis sepdekkvinjaraĝa, la 26an de marto 2019 ĉe Sesto S. Giovanni, la urbo kie li loĝis.

Terura, fulma malsano forprenis lin nur kvin semajnojn post ĝia elkovro.

Giovanni Daminelli naskiĝis en Bergamo la duan de aŭgusto 1943, la unua el kvar gefratoj.

Li diplomiĝis kiel elektra inĝeniero ĉe la industria Instituto "P. Paleocapa" de Bergamo

Come studente lavoratore si laureò in matematica nel 1982 presso l'università statale di Milano. Lavorò presso il Centro di Ricerca e Calcolo Scientifico delle Industrie Pirelli di Milano ricevendo numerosi premi per le sue invenzioni. Nel 2000 cominciò a studiare l'esperanto.

S'iscrisse al KEC (Katolika Esperanta Centro) di Milano, all'UECI (Unione Esperantista Cattolica Italiana), all'IKUE (Internacia Katolika

Kiel studento - laboristo li doktoriĝis en matematiko en la jaro 1982 ĉe la Ŝtata Universitato de Milano. Li laboris ĉe la Centro de Scienca Esplorado kaj kalkulo de la Industrioj Pirelli en Milano ricevante multajn premiojn pro siaj inventoj. En la jaro 2000 li komencis studi esperanton.

Li aliĝis al KEC (Katolika Esperanta Centro) en Milano, al UECI (Itala Esperanta Katolika Unuiĝo), al IKUE (Internacia Katolika Esperanta

Unuiĝo Esperantista) e alla Federazione Esperantista Italiana (FEI).

Nel 2003 superò l'esame di terzo grado per l'insegnamento dell'esperanto. Subito cominciò a insegnare esperanto presso l'università della terza età di Milano e presso il "Circolo Esperantista Milanese".

Presidente dal 2003 dell'UECI, redasse fino alla sua morte la rivista Katolika Sento e creò il sito dell'associazione www.ueci.it.

Fu segretario dello IIE e consigliere del Circolo esperantista Milanese.

Organizzò molti corsi di esperanto a Milano presso l'università della terza età, nella sede del centro esperantista milanese e presso il liceo linguistico Manzoni.

Fu tutor di 150 corsisti del Corso Kirek.



Partecipò a moltissimi congressi universali di esperanto, ai congressi Ikue, a quelli ecumenici, ai Bibliaj tagoj e a quelli da lui organizzati in Italia.

Nel 2012 è stato eletto presidente dell'IKUE, carica che tenne fino alla morte.

Unuiĝo), al FEI (Itala Esperanta Federacio).

En la jaro 2003 li sukcesis en la triagrada ekzameno por instruado de Esperanto. Tuj li komencis instrui esperanton ĉe la triaĝa Universitato en Milano kaj ĉe la CEM (Milana Esperanta Klubo).

Prezidanto de UECI de la jaro 2003, li redaktis la revuon KATOLIKA SENTO ĝis sia morto kaj li kreis la retejon de la asocio www.ueci.it.

Li estis sekretario de IIE (Italaj Esperantistoj Instruistoj) kaj konsilanto de la Milana Esperanta Klubo.

Li organizis multajn esperantajn kursojn ĉe la triaĝa Universitato en Milano, ĉe la sidejo de CEM kaj ĉe la Liceo Manzoni. Li estis kuratoro de 150 kursanoj de la kurso KIREK.



Kongreso U.E.C.I. Rimini 2003

←G. Daminelli kun du lernantoj

<https://it->

[it.facebook.com/CircoloEsperantistaMilano/](https://it-facebook.com/CircoloEsperantistaMilano/)

Li partoprenis multajn universalajn esperantajn kongresojn, tiujn ekumenajn, la kunvenojn de Bibliaj Tagoj kaj la aliajn kiujn li mem organizis en Italio.

En la jaro 2012 li estis elektita prezidanto de IKUE, ofico kiun li tenis ĝis la morto.

Per moltissimi anni organizzò, con l'amico Gianni Conti, la presenza di un gruppo di esperantisti in piazza San Pietro a Roma.

Durante la benedizione del Papa, a Natale e a Pasqua, essi innalzavano grandi pannelli con le lettere della parola "ESPERANTO".

Dum multaj jaroj li organizis kune kun la amiko Gianni Conti la ĉeeston de grupo da esperantistoj en placo Sankta Petro en Romo. Dum la beno de la Papo, la tagojn de Kristnasko kaj Pasko, ili levis grandajn panelojn sur kiuj estis skribitaj la literoj de la vorto "ESPERANTO"



Romo

G. Conti, G. Daminelli e G. Bottoni

<http://www.ikue.org> ↓



Per il Centro cattolico esperantista di Milano organizzò la Santa Messa in esperanto ogni terzo sabato del mese. Sul sito dell'associazione ha reso disponibili per tutti il Messale, il Lezionario Festivo e i testi della messa in esperanto.

Por la Esperanta Katolika Centro de Milano li organizis la Sanktan Meson en esperanto la trian sabaton de ĉiu monato. En la retejon li publikigis je dispono de ĉiuj la Meslibron, la Festan Lecionarion kaj la tekstojn de la Meso en esperanto.

MISTERO DE LA ENKARNIĜO DE LA SINJORO

- [TEMPO DE ADVENTO](#)
- [TEMPO DE KRISTNASKO](#)
- [TEMPO POST EPIFANIO](#)

MISTERO DE LA PASKO DE LA SINJORO

- [TEMPO DE KARESMO](#)
- [AŬTENTIKA SEMAJNO](#)

	jaro A		jaro B		jaro C		
Palmodimanĉo:	C	K	C	K	C	K	
Sankta Ĵaŭdo:	...	...	...	...	...	...	(en la Vespermanĝo de la Sinjoro)
Sankta Sabato Vespere:	...	...	...	...	...	...	Paska tranokto

- [PASKA TEMPO](#)

MISTERO DE LA PENTEKOSTO

- [TEMPO POST PENTEKOSTO](#)
- [TEMPO POST LA MARTIRIGO DE SANKTA JOHANO](#)
- [TEMPO DE LA DEDIĈO DE LA KATEDRALO](#)

http://www.ueci.it/grupoj/Milano/nla_mesoj.htm

Per migliorare la conoscenza dell'esperanto da alcuni anni organizzava ogni mercoledì un incontro di conversazione dove era vietato l'uso della lingua italiana.

Por plibonigi la scion de la lingvo esperanto, dum kelkaj jaroj, ĉiun merkredon, li organizis konversacian renkontiĝon dum kiu la uzo de la itala lingvo estis malpermesita.



Konversacia renkontiĝo ĉe la sidejo de la Milana Esperanta Centro

Nel circolo esperantista milanese tenne innumerevoli conferenze sulla lingua, sulla cultura esperantista e su altri argomenti culturali. Daminelli, infatti, era un uomo con molti interessi. Era appassionato di musica classica e suonava alcuni strumenti musicali. Era appassionato di frattali e sognava in futuro di avere più tempo per dedicarsi a questo studio. Fu molto attivo nella sua parrocchia a Sesto San Giovanni come membro del consiglio pastorale.

Ĉe la Esperanta Milana klubo li faris sen-nombrajn prelegojn pri la lingvo, pri la esperanta kulturo kaj pri aliaj kulturaj temoj. Daminelli, fakte, havis multajn interesojn. Li pasiigis por la klasika muziko kaj ludis kelkajn muzikajn instrumentojn. Li ŝatis fraktaĵojn kaj li songis havi, en la estonteco, pli da tempo por dediĉi al tiu-ĉi studado. Li estis tre aktiva en sia paroĥejo de Sesto S.Giovanni kiel membro de paroĥa konsilio.



**Estraro de la Milana esperanta klubo
2018**

<https://it-it.facebook.com/CircoloEsperantistaMilano/>



**Prelego de Daminelli
la Milana esperanta klubo- 2018**

<https://it-it.facebook.com/CircoloEsperantistaMilano/>

Rememoro pri Johano el la milana esperantistaro.

Homoj kiel Johano ne ofte naskiĝas kaj lia forpaso estas por ni samideanoj ne nur home doloriga, sed ankaŭ neplenigebla. Johano estis por ni donaco, anĝelo kiu moviĝis sur la piedpintoj ene de la movado donante al ni ĉiuj multon, eĉ nin trodorlotante, sen peti de ni ion: donaci estis por li rekompenco.

La kursoj pri Esperanto zorgataj de li, la kunvenoj de li organizitaj en nekritikebla maniero, la ĉiam intereseĝaj prelegoj, kiuj temis pri diversaj aferoj: de Esperanto ĝis matematiko, biografioj, anekdotoj, ktp vere multe mankos al ni ĉiuj.

Eĉ se lia ĉeesto mankos, li lasis al ni sian heredaĵon: la validaj junuloj, kiu laŭ liaj ideoj kunlaboras por daŭrigi la disvastigadon de la internacia lingvo kaj tiamaniere la pacan mesaĝon de Zamenhof.

La Kredo, kiu lin akompanis dum sia vivo, donas al ni la konsolon, ke malgraŭ la doloriga malsano li akceptis serene la finon de sia surtera ekzistado.

Dankon Johano.

LA FUNEBRA RITO EN BERGAMO

Parrocchia S. Sisto - Colognola Bergamo

giovedì, 28 marzo 2019:

**Santa Messa di saluto
al signor Giovanni Daminelli**



Antifona d'Ingresso Sal 138,23-24

Scrutami, o Dio, e conosci il mio cuore;
vedi se percorro una via di menzogna,
e guidami sulla via della vita.

Il funerale si è svolto giovedì 28 marzo alle 15 presso la chiesa di San Sisto nel quartiere Colognola di Bergamo.

Presso la bara stava la bandiera dell'Esperanto. Erano presenti molti esperantisti provenienti principalmente da Milano e dall'Italia settentrionale. Hanno concelebrato la messa tre sacerdoti, fra i quali il membro del Comitato centrale dell'IKUE fra Pierluigi Svaldi che ha letto l'omelia. A nome dell'Ikue, in esperanto, ha letto un messaggio la vicepresidente Marija Belošević.

La funebra rito okazis ĵaŭde la 28-an de marto 2019 je la 15-a horo en la preĝejo de Santa Siksto en la kvartalo Colognola de Bergamo.

Ĉe la ĉerko estis la flago de Esperanto.

Multaj estis la ĉeestantaj esperantistoj ĉefe el urbo Milano kaj norda Italio.

Kuncelebris la meson tri pastroj, inter ili la estrarano de IKUE frato Pierluigi Svaldi kiu predikis.

Nome de IKUE esperantlingve legis mesaĝon la unua vicprezidantino Marija Belošević.



Preĝejo de Sankta Sisto – Colognola de Bergamo

Alla fine della cerimonia il suo parroco appositamente venuto da Sesto San Giovanni, ha ricordato il suo carattere dolce e riservato. Giovanni era capace di donare suggerimenti sempre costruttivi. Ha ricordato anche la sua capacità di aggregare persone di nazionalità diverse, anche grazie alla sua esperienza maturata nel mondo esperantista. Norma Cescotti Covelli e l'amico Gianni Conti hanno attestato la loro amicizia con ricordi commoventi.

Hanno letto messaggi la vicepresidente dell'IKUE Marija Belošević, la vicepresidente dell'UECI Tiziana Fossati e la rappresentante del Cem di Milano.

Je la fino de la ceremonio lia paroĥestro, specife alveninta de Sesto S.Giovanni, memoris lian dolĉan kaj rezervitan naturon.

Johano kapablis doni ĉiam konstruajn sugestojn. Li memoris ankaŭ lian kapablon kunigi homojn de diversaj nacioj, ankaŭ danke al lia sperto akirita en la esperanta mondo. Norma Cescotti Covelli kaj la amiko Gianni Conti atestis siajn amikecon per korduŝantaj memoroj.

Legis mesaĝojn la vicprezidentino de IKUE Marija Belošević, la vicprezidentino de UECI, Tiziana Fossati kaj la reprezentantino de la CEM de Milano.



Daminelli è stato sepolto nel cimitero di Colognola di Bergamo, dove riposano anche i suoi genitori.

Daminelli estis enterigita en la tombejo de Colognola de Bergamo, kie ankaŭ liaj gepatroj repozas.



Samideanoj recitas la preĝon "Patro nia" ĉe la tombo de G. Daminelli en la tombejo de Colognola de Bergamo

<https://eo-eo.facebook.com/pages/Internacia-Katolika-Unuiĝo-Esperantista/263471327120529>

OMELIA

Tu lo sapevi. Sì, tu lo sapevi.

Il tempo per te si era fatto breve. Molto breve. Per questo ti davi da fare, lavoravi intensamente, anche di notte; eri disposto a offrire il tuo aiuto a chiunque te lo avesse chiesto.

Sì, tu lo sapevi. Sapevi che i tuoi giorni erano contati. Anche noi lo sapevamo. Ma non ci credevamo. Così, apportando varie scuse, ti davamo lavoro da svolgere, ci affidavamo alla tua disponibilità, ti abbiamo delegato su tante cose pur di godere della tua presenza.

Sì, perché inconsciamente avevamo capito che presto te ne saresti andato.

Ora sei qui. Sei qui con noi per celebrare la sant'eucaristia.

Tu ci hai dato l'appuntamento e noi siamo venuti. La tua presenza delicata, più silenziosa che mai, ci stordisce al di là di ogni aspettativa: come un'omelia sulla vita, sulla nostra vita pellegrina quaggiù, un'omelia sulla vita che ci aspetta lassù, sulla vita piena e senza limiti riservata a tutti coloro che vi anelano.

Le abbiamo sentite anche noi quelle parole confortanti che tu hai sentito lì sul letto dell'ospedale:

"Venite a me, voi tutti che siete stanchi e oppressi, e io vi darò ristoro.

Prendete il mio gergo sopra di voi e imparate da me, che sono mite e umile di cuore, e troverete ristoro per la vostra vita".

E tu ci hai creduto subito, hai chiuso gli occhi e ti sei affidato.

Troppo bello per rifiutare, veramente interessante dopo una vita intensa e impegnata.

Ora, tu che te ne sei andato, non smetterai di ripetere lassù quelle parole consolanti che anche noi abbiamo udito quaggiù da quest'ambone, appena un momento fa:

«Ti rendo lode, Padre, Signore del cielo e della terra, perché hai nascosto queste cose ai sapienti e ai dotti e le hai rivelate ai piccoli».

E' vero, non è facile credere alle cose semplici, non è scontato che si riesca a essere piccoli davanti alle verità della vita e della storia.

Ci accorgiamo spesso di giocare a fare i sapien-

HOMILIO

Vi tion sciis. Jes, vi tion sciis.

La tempo por vi estis fariĝinta mallonga. Tro mallonga. Pro tio vi penadis, laboradis intense, eĉ nokte; vi estis ĉiam preta proponi vian helpon al ĉiu ajn estus ĝin petinta de vi .

Jes, vi tion sciis. Vi sciis ke vi havis nombritajn tagojn. Ankaŭ ni tion sciis. Sed ni tion ne kredis.

Tiel ke, ni alportante variajn pretekstojn, donis al vi plenumeban laboron , ni nin konfidis al via disponemo, ni vin delegis pri multaj aferoj por ke ni ĝuus vian ĉeeston. Jes, ĉar senkonscie ni komprenis, ke vi estos foririnta.

Nun vi estas ĉi tie kun ni por celebri la sanktan eŭkaristion.

Vi mem fiksas al ni rendevuon kaj ni alvenis.

Via delikata ,eĉ plej silenta ĉeesto, nin konsternas preter ĉia ajn atendo, kiel homilio pri la vivo, pri nia pilgrimanta vivo ĉi-sube, homilio pri la vivo nin atendanta tien supren, pri la vivo plena, senlima rezervata al tiuj kiuj al ĝi sopiras.

Ankaŭ ni aŭdis tiujn kuraĝigajn vortojn, kiujn vi aŭdis tie, en la malsanuleja lito,

“Venu al mi vi ĉiuj, kiuj estas lacaj kaj subpremataj, kaj mi donos al vi revigligon.

Prenu mian jugon sur vin kaj lernu de mi, kiu estas milda kaj humilkora, kaj vi trovos revigligon por via vivo .”

Kaj tuj vi tion kredis, vi fermis la okulojn kaj vi vin konfidis.

Tro bele por refuzi, tro interesa post intensa kaj engaĝita vivo.

Nun vi, foririnta, ne ĉesos tie supre repeti tiujn kuraĝigajn vortojn kiujn ankaŭ ni aŭdis ,ĉi-sube de ĉi tiu ambono, ĵus antaŭ unu momento :

“ Mi laŭdas vin, Patro, Sinjoro de la ĉielo kaj de la tero, ĉar vi kaŝis tion antaŭ la saĝuloj kaj la kleruloj kaj rivelis tion al la etuloj”

Estas vere, ne estas facile kredi al la simplaĵoj, ne estas evidente ke oni sukcesos esti etaj kaj humilaj ,antaŭ la vero de la vivo kaj de la historio. Ni jam ekkonsciis ke ofte ni ludas la rolon

ti, che cerchiamo sempre di essere considerati dotti ed esperti.

Ma tu, Giovanni,

portando il nome “Dio fa grazia”, avevi gli occhi addestrati a riconoscere in ognuno di noi la grazia di Dio e la sua bellezza, rendendo grazie a Dio per averci incontrato e conosciuto.

La parola di Dio ci ha ricordato che

«*La salvezza dei giusti viene dal Signore*».

Questo ci consola molto.

Ora che Giovanni non è più fra noi, sarà il Signore ad accogliere la sua anima nella luce e nella pace.

Noi lo affidiamo a lui, sicuri della misericordia di Dio.

Abbiamo sentito pure che:

«*Le anime dei giusti sono nelle mani di Dio, nessun tormento li toccherà*».

Anche questo ci consola molto:

ricordare Giovanni nelle mani di Dio ce lo farà sentire più vicino, più amico, più nostro compagno di viaggio in questo mondo dove tutti siamo pellegrini.

E la parola di Gesù nel vangelo che abbiamo appena ascoltato ci invita a guardare quello che vede Dio: lo sguardo del Padre che è nel cielo è quello vero e santo, molto diverso da quello che vediamo noi, l'unico sguardo che ci fa sentire figli suoi e che ci salva sempre, soprattutto nell'ultimo giorno.

Frato Pierluigi Svaldi

de saĝuloj , ke ni ĉiam serĉadas esti konsiderataj kleruloj kaj spertuloj.

Sed vi, Johano,

havanta la nomon “ Dio faras gracon ”

havis la okulojn kutimigitajn rekoni en ĉiu el ni la gracon de Dio kaj ĝian belecon ,dankema al Dio pro viaj renkontiĝo kaj ekkonatiĝo kun ni.

La parolo de Dio memorigis al ni ke

“ La savo de la justuloj venas de la Sinjoro ”

Tio multe nin konsolas.

Tuj kiam Johano ne estas plu inter ni , estas la Sinjoro kiu akceptas lian animon en la lumo kaj en la paco.

Ni al Li konfidas lin, certaj pro la mizerikordo de Dio.

Ni aŭdis ankaŭ ke:

“La animoj de la justuloj estas en la manoj de Dio, neniur turmento tuŝos ilin” . Ankaŭ tio multe nin konsolas:

memorante Johanon en la manoj de Dio ni sentos ke li estas pli apude, pli amiko, pli nia kunvojaĝanto en tiu ĉi mondo kie ni estas ankoraŭ pilgrimantoj.

Kaj la parolo de Jesuo en la Evangelio, kiun ni ĵus aŭskultis, invitas nin rigardi tion, kion vidas Dion: la rigardo de la Patro kiu estas en la ĉielo estas tiu vera kaj sankta, tre malsama ol tiu kiun ni vidas, la ununura rigardo kiu sentigas ke ni estas liaj filoj kaj ke Li savas ĉiam nin, precipe dum la lasta tago.



2009

Vroclavo (Pollando)

Ekumena Esperanto-Kongreso

Caro Giovanni,
ho ancora davanti agli occhi il tuo ultimo messaggio che mi hai mandato in risposta al mio. Ti chiedevo come mai eri finito in ospedale e tu, con grande semplicità mi hai scritto:

" Non temete voi tutti. Non ho nulla. Fra qualche giorno tornerò a casa e vi farò lavorare più di prima perché c'è tanto da fare". Eri tanto rassicurante che io ti ho creduto.

Dopo sei tornato ma per ripartire subito per un lungo viaggio, senza ritorno.

E tutti noi siamo sbigottiti e increduli che ciò sia accaduto. Abbiamo dentro di noi e intorno ...solo il vuoto. Perché tu eri la nostra guida, meglio il nostro maestro.

Ogni tua iniziativa, ogni progetto era prezioso e noi ti seguivamo docili con la certezza che tu avresti portato tutto a compimento. Era

bello lavorare con te: mai una critica, un rimprovero, nemmeno la più piccola osservazione. Apprezzavi il nostro lavoro anche se, forse, qualcosa non sarebbe stata di tuo gradimento. Eri sempre pronto ad ascoltarci, lavoravi giorno e notte, di qua e di là, senza dimostrare mai la tua stanchezza. Che faremo noi, senza di te?

Però siamo sicuri che tu, da lassù, ci seguirai e noi tenderemo di continuare la tua opera, ricordando i tuoi consigli, evitando gli errori.

Dankon, kara Johano, pro ĉio de vi al ni farita kaj donita. Ni estos ĉiam kun vi, kun la konscio ke vi neniam forgesos nin.

Saluton.

Norma Cescotti Covelli

Kara Johano,
mi havas ankoraŭ antaŭ la okuloj la lastan mesaĝon kiun vi sendis al mi respondante al la mia. Mi demandis al vi la kialon de via eniro en malsanulejon kaj, per granda simpleco, vi respondis tiel: " Ne maltrankviliĝu! Mi havas nenion. Post kelkaj tagoj mi revenos hejmen kaj tiam mi laborigis vin pli multe ol antaŭe ĉar estas tiom plenumebla" Vi estis tiel trankviliga ke mi kredis al vi.

Male, anstataŭ reveni, vi ekiris tuj por longa senrevena vojaĝo. Ni ĉiuj estas konsternitaj kaj nekredantaj ke tio jam okazis. Enen, en niaj animoj kaj ĉirkaŭ ni estas granda malpleno. Vi estis nia gvidisto, nia instruisto.

Ĉiu via entrepreno, ĉiu via projekto estis altvalora kaj ni sekvis vin, cedemaj, kun la certeco ke vi estos plenuminta ĉion.

Estis bele kunlabori kun vi: neniam kritiko, aŭ riproĉo, eĉ la plej eta observo.

Vi ŝatis nian kunlaboradon, kvankam io ne estus de vi favore akceptita.

Vi estis ĉiam preta aŭskulti nin, vi laboradis tage kaj nokte, tie kaj ĉi tie, neniam montrinte signojn de laceco. Nun kion ni farus sen vi?

Konsolas nin la espero ke vi de tie supre nin sekvos ankoraŭ kaj niaflanke ni promesas al vi daŭrigi vian agadon, sekvi zorge viajn konsilojn, senti ke vi ĉiam ĉeestas dum la malfacilaĵoj. Dankon, kara Johano, pro ĉio de vi al ni farita kaj donita. Ni estos ĉiam kun vi, kun la konscio ke vi neniam forgesos nin. Saluton.



Bibliaj Tagoj en Mainz 2018

F. Sorosina, F. Trussardo, N. Cescotti Covelli kaj G. Daminelli

Estimataj,

karaj familianoj de la karmemora Giovanni Daminelli kaj ĉiuj vi, ĉi tie kolektitaj ĉe la adiaŭa momento. Akceptu sinceran kondolencon de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, kies Giovanni ekde 2003 estis la kontoreviziisto kaj de la jaro 2012 prezidanto. Li estis la 16-a prezidanto dum ĝia pli ol centjara historio. Li estris UECI kaj redaktis "Katolika Sento", kreis kaj prizorgis la oficialan paĝaron de la itala IKUE-sekcio (www.ueci.it). Ankaŭ li gvidis E-kursojn en Milano ĉe la "Universitato de la tria aĝo" kaj en la urba E-klubo.

Krom naciskale, en la internacia nivelo li organizis la kongreson en Trento-Cadine.

Temis pri la ekumena kongreso, kaj ĝuste por ekumenismo li havis apartan senton. Li partoprenis plurajn ekumenajn kongresojn. Regule li partoprenadis la Bibliajn tagojn, al kiu li ĉiam volonte kunportis kelkajn pliajn personojn. De la jaro 2012 IKUE regule organizas esperantigon de la tekstaro por la Preĝsemajno por unuigo de kristanoj, al kiu traduke kontribuas deko da esperantistoj de la tuta mondo. Giovanni regule tradukis la enkondukan parton, en kiu estis klarigita la devizo de la semajno. Ekster IKUE, li estas membro de la paŝtista konsilantaro de sia paroĥo, sekretario de la Itala Instituto de Esperanto kaj konsiliano de la E-klubo de Milano.

Je ĉi tiu momento la katolikaj esperantistoj dise de la mondo preĝe estas unuigitaj kun ni. La pastroj-esperantistoj estis invititaj celebri la mesojn, ĉu hodiaŭ, ĉu ene de oktago.

Hodiaŭ la meson celebris la ĉefepiskopo de Alba Julia en Rumanio Georgo Jakubinyi kaj mons. Gabriel Anda en Kamerunio. La 2-an de aprilo en Žirovice, Ĉeĥio la meson celebros sac. Max Kasparu.

Kara Giovanni,

"Danko" estas la sola vorto kiun ni, la katolikaj esperantistoj povas diri apud via ĉerko. La Mizerikordo Patro akceptu vin en sia Regno.

Dankon pro ĉi bela vort', dankon pro ĉiu kunpreĝ' dankon pro ĉio.

Daŭriĝu sekvi vian kaj nian IKUE de la ĉielo kie ni iam ĉiuj denove renkontiĝos.

Marija Belošević, la 1-a vicprezidantino de IKUE



Estraro de IKUE Bibliaj tagoj – Trento 2012

JEN MI

Giovanni Daminelli

En la itala http://www.ueci.it/k_sento/ks_2003/ks_2003_n5.htm#aI_01

Jen mi. Mi estas la nova prezidanto UECI..... Konscia pri miaj limoj, mi akceptis ĉi tiun taskon per iom da senprudenteco, sed iu devis ja prizorgi ĝin kaj la insisto de tiom da amikoj estas min konvinkita. Miaj limoj, kiuj markas la diferencon kun mia antaŭulo, estas baze ĉi tiuj du:

1) Mi estas esperantisto kaj aliĝis en la UECI ekde 2000 , el tio sekvas ke: mi konas iom pri historio, el ankaŭ ne longe, de nia movado, mi konas malmulte pri personoj kiuj en ĝi partoprenas kaj ne ankoraŭ mi atingis la lingvan lertecon de tiu kiu praktikas esperanton de multaj jaroj.

2) Mi ne havas sperton pri administra aŭ publika rilato; ĝis nun mi interesiĝis ekskluzive pri inĝenieraj kaj kalkulaj problemoj, do mi esperas, ke vi pardonos kelkajn miajn nevolajn rilatajn mankojn kaj, se estos necese, fratece bonvolu korekti tion.

Mi estas nur amatoro, sed kun la helpo de la bona Sinjoro mi provos superi miajn limojn por povi servi Lin profesie. Nia pastro Duilio iam devis deklari ke esperanto estas verko de la Sankta Spirito; tiu ĉi laboras uzante homojn kaj esperanto estas la kampo en kiu li vokis nin funkcii. Tial mi komencis prezenti min kun “ Jen mi”; ĝi estas la vorto per kiu oni ofte respondas al la alvoko de la Sinjoro en la Sankta Skribo. Mi certe ne kuraĝas, kun ĉi tio, min kompari kun Abraham, Samuel, Isaiaĥ aŭ kiom da aliaj, sed mi konscias ke en la kampo de la Sinjoro ĉiu rolo estas grava kaj ke Li provizos miajn mankojn.

Ni ĉiuj estas implikitaj kaj ni ĉiuj povas kunlabori, eĉ tiuj kiuj ne havas specifajn taskojn ; sufiĉas iafoje ankaŭ nur raportoj pri io malbona, sin disponigi, ne krei nenecesajn malfacilaĵojn , fari sugestojn, kun spirito de servo en la senso ke se oni sugestas ion estas bone ke li tiam donas sian displonecon kaj ke se lia ideo ne estas akceptita li ne devas ĉesi kunlaboron; ni ĉiuj laboras por la sama Majstro kiu ankaŭ restarigus tiujn valorojn kiujn homoj ne agnoskas . Je tiu ĉi punkto oni atendas scii kion ni intencas fari, do mi prezentas programon. Mi indikos nur la ĝeneralajn liniojn, por ke la detaloj devos esti deciditaj kaj aprobitaj de la Centra Komitato. Ĉio estas jam spurita en la unua artikolo de nia statuto kie la celoj de nia asocio estas:

a) La formado de niaj membroj: pro tio ni organizas S. Mesojn en esperanto, la lokajn kunvenojn, la naciajn kongresojn UECI kaj la partoprenon en la internaciaj kongresoj IKUE.

Ĉi-rilate Katolika Sento devas esti ilo ne nur formanta sed ankaŭ informa por faciligi la partoprenon de la interesitoj al diversaj iniciatoj

b) La atesto de la Evangelio, ne nur reciproka atesto inter ni, sed ĉefe al la ekstero, ambaŭ kun niaj samlandanoj aktive partoprenante en iu laika esperantista organizo kaj en niaj interkonaj rilatoj en internacia kampo, ĝi ne forgesante la bonfaradojn. En ĉiu situacio ĉiu donu ateston pri disponebla kaj kongrua persono kun propraj kristanaj principoj.

c) La ekumena dialogo: ĝi esprimiĝas kaj en interhomaj rilatoj, kaj per partopreno en ekumenaj kongresoj, precipe en komuna preĝado, en reciproka scio kaj en la ekserco de la karitato; tio devas esti kultura fakto: ni devas plifortigi niajn konvinkojn por ekscii kiom bone ekzistas en la alia sen rezigni pri nia identeco.

d) Uzo de esperanto: ĝi estas la instrumento de nia laboro; ni devas profundigi nian scion , ĉiam prizorgi nin por esti pretaj uzi ĝin kiam ĝi bezonata. Tiuj kiuj povos sin devontigu instrui ĝin kaj disvastigi lian uzon. Ni devas antaŭenigi prozelitismen precipe inter la junuloj; mi tre emas

propagandon kaj subtenon ne nur loke sed ankaŭ internacie..... Mi promesas renkonti ĉiujn baldaŭ por ekkoni homojn kaj problemojn. Ni ĉiuj helpu unu la alian per preĝo, kun aparta penso por via prezidanto kiu, mi sentas, bezonos ĝin. Dio rigardu nin kaj bonan laboron.



Bibliaj tagoj 2012 – Ortodoksa preĝejo en Rovereto

- Kongreso U.E.C.I. 2016 Assisi
- Ekumena kongreso 2014- Sinagogo en Merano



INTERVJUO DE LA REDAKTORO DE VATICANA RADIO

CARLO SARANDREA AL G.DAMINELLI

CS. Ekde pasinta februaro Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista havas novan prezidanton. Temas pri la 16a prezidanto ekde la starigo de la Unuiĝo en 1910. Li estas la itala doktoro Giovanni Daminelli.

CS. Kaj Esperanto? Kiam kaj kiamaniere Vi ekkonis ĝin? En la senco: matematiko kaj kalkuladoj jes iel estas kompareblaj al Esperanto, lige kun prefiksoj kaj sufiksoj, kvazaŭ matematika formulo, sed se dum mi diras tion, mi jam aŭdas riproĉojn de esperantistoj, ĉar mi diras la saman tezon kiun de tempo al tempo, ekde pioniraj jaroj, oni levis kontraŭ Esperanto, por diri ke ĝi ne estas vivanta, homa lingvo ...

GD. Efektive jes.

Mi doktoriĝis per tezo pri matematika logiko, kaj profesie devis lerni kelkajn komputilajn lingvaĵojn, pro tio mi emis interesiĝi pri lingvistiko. Komence mi imagis, ke Esperanto, artefarita lingvo, estas ia speco de komputila kodo, kiu, pro tio, ne povas esprimi ĉiujn nuancojn de

la homaj lingvaĵoj.

Kiam oni sciigis al mi, ke la Katolika Esperanto-Centro de Milano, starigis kurson pri ĉi tiu lingvo, fare de nia neforgesebla Glauco Corrado. Mi tuj aliĝis, nur pro scivolemo.

Baldaŭ mi komprenis, ke Esperanto ne estas kodo, sed vera lingvo, per kiu oni povas esprimi la ĉian ideon, mesaĝon, senton. Ĝi estas vere genia planlingvo.

CS. Kiamaniere Vi fariĝis esperantisto?

GD. Konvena demando, ĉar ne ĉiuj, kiu lernis Esperanton estas esperantistoj.

Mi esperantiĝis en la jaro 2000, kiam mi eltenis la unuagradan ekzamenon.

En tiu jaro, en Rimini okazis la 53a IKUE-kongreso. Ankaŭ en ĉi tiu okazo, mi aliĝis nur pro scivolemo: mi volis sperimenti mia kono de la lingvo post sesmonata kurso.

Mi miregis konstatante, ke mi komprenas preskaŭ ĉion kaj eĉ kapablis iomete paroli.

Por mia profesio, ĉiutage mi devis uzi la anglan, kaj ĉiujare mi vizitis kurson pri la angla lingvo, malgraŭ tio, mi devis konstati, ke mia kompreno de la esperanta elparolo estas pli alta ol tiu de la angla. Tio entuziasmigis min kaj faris min esperantisto.

.....
CS. Vi diris, ke Vi aktivis ĉefe en la itala E-movado. Kiel Vi fartas – por tiel diri - en internacia medio, kun grava tasko?

GD. Sincere mi konfesas, ke multaj aspektoj de la vivo de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista estas por ni nekonataj.

Kial do mi akceptis kandidatiĝi por ĉi tiu tasko? La insisto de kelkaj samideanoj, kiuj firme kaj afable petis tion, konvinkis min.

Eble mi ne estas la plej taŭga persono - pri tio mi konscias - sed devas esti ja iu, kiu surprenas ĉi tiun ŝarĝon. Tamen, mi konfidas en la dia helpo, ĉar ni scias, ke Li por realigi siajn projektojn elektas plej ofte la ŝajne malplej dignajn, por ke ili estu simpla ilo en Liaj manoj.

CS. Cent du jara historio estas malantaŭ Vi. Ne eblas resumi la tutan historion ĉi tie, sed almenaŭ ni diru, kiamaniere Vi imagas la estontecon de IKUE. Kiu estas Via laborplano, se mi povas tiel paroli.

GD. Mi plene konscias, ke mi ricevis taskon, kiu daŭrigas jardekojn da sinoferema, malavara kaj ofte ne-konata agado de miloj da homoj. Al la antaŭaj Prezidantoj miaj antaŭuloj mi adresas mian profundan dankemon kaj admiron. Jes la agado por fari estas multa. La celoj kaj la vojo estas priskribitaj de nia statuto: pere de la lingvo Esperanto, realigi religian, eklezian kaj laikan sperton, montri la unuecon de la Eklezio, uzante la internacian lingvon en ĝia liturgia kaj apostola agado; kontribui al realigo de la homaj interkompreno, frateco kaj paco en la nuntempa mondo; agadi por la ekumena movado.

CS. La planita agado estas vere multa, ĉu oni povas realigi ĉion?

GD. Nia movado travivas situacion saman al la multegaj movadoj tra la mondo bazitaj sur volotulado. La aferoj por fari superabunde superas la kunlaborantojn je dispono. Mi petas de ĉiuj preĝojn, por ke Dio sendu laborantojn en sian vitejon.

Mi konfidas, ke la Providenco – kiu cetere neniam mankis en nia rondo – daŭre subtenu nin.

.....
CS. Ni kore dankas pro Via komplezemo, akcepti kelkajn demandojn de ni.

GD. Estas mi kiu dankas Vin pro Via gastigemo.

Carlo Sarandrea

<http://radio-vatikana-esperanto.org/elsendo.php?d=2019-04-25>



- Kongreso U.E.C.I Tavernola Como 2006 - Carlo Sarandrea, pastro Cadei e Giovanni Daminelli
- Kretinga (Litovio) 2004

MIA KARA AMIKO JOHANO,

mi scias ke vi aŭskultas min . Mi dankas vin ĉar vi estis ĉiam ĉe mia flanko kiam ni iris, dum sinsekvaj dektri jaroj , ĉe Kristnasko kaj Pasko, kun niaj paneloj al Romo, en la placo Sankta Petro, por danki la Papon, kiu legis siajn bondezirojn en Esperanto.

Mi dankas vin, plue, pro la grandega laboro kiun vi faris , ĉu kiel prezidanto de du esperantaj asocioj , ĉu kiel tre bona instruisto.

Mi ne scias kiel ni povos daŭrigi, kun sukceso, la laboron kiun vi forlasis al ni ; tio estos ege malfacila kaj, mi timas, preskaŭ neeble por ni !

Sed la plej bela afero kiun vi lasis al ni estis via boneco kaj via granda kristana fido, malfacilaj kompareblaj de ni ĉiuj , viaj geamikoj.

Dankon, Johano, kaj mi rekomendas vin : tenu por mi lokon ĉe vi ĉar post mallonga tempo mi venos trovi vin.

Via granda amiko Gianni



Giovanni Daminelli kaj Gianni Conti en la ĝardeno Esperanto ĉe Cormano (Italio) 2010
(Fotis Miloslav Svacek)



Foa, Daminelli kaj Fugazzola en Milano



**Daminelli kaj A. Serio Kongreso
UECI 2012- Albisola**



**Ekumena Kongreso 2015 –
Strasburgo
Daminelli, T. Fossati, F. Trussardo,
F. Sorosina kaj N. Cescotti Covelli**

Saluto dell'U.E.C.I

Anche la comunità dell'UECI, Unione esperantista cattolica italiana, di cui Giovanni era presidente, prega per il nostro fratello Giovanni: qui, nel momento e luogo delle esequie, e ovunque, con la comunione in Cristo che ci permette una reale vicinanza spirituale.

Il distacco da lui, così improvviso, e anche il modo in cui la malattia lo ha tolto a noi, hanno causato in tutti un grande dolore, che solo la fede può consolare.

Insieme al conforto della fede, ci danno pace e suscitano riconoscenza il dono di averlo potuto conoscere e la testimonianza che ci lascia: quella di una vita vissuta nella docilità allo Spirito del Signore e di un uomo dal grande cuore, saggio, umile, attento al prossimo molto più che a se stesso.

Queste caratteristiche, unite al suo carattere mite, hanno sempre fatto sì che, anche nel movimento esperantista, tutti coloro che lo avvicinavano non solo lo apprezzavano, ma diventavano suoi amici. I moltissimi messaggi di cordoglio in arrivo, anche da altri paesi, all'associazione o pubblicati in Internet, sottolineano questo.

Ci è stato detto che gli esperantisti erano per lui come una famiglia e questo ci ha commosso, perché questa bellissima espressione "essere famiglia" è proprio il sentimento che ci ha legato. Sentiamo questo in modo particolare oggi, nel momento in cui condividiamo la preghiera e l'affetto dell'anima.

Ai suoi familiari le nostre condoglianze più sentite e affettuose. Al Signore leviamo il ringraziamento per il dono che ci ha fatto con Giovanni. **E grazie a te, Giovanni.**

Funebra adiaŭo de U.E.C.I

Ankaŭ la komunumo de UECI, Itala Katolika Unuiĝo Esperantista, kies prezidanto Giovanni estis, preĝas por nia frato Giovanni: ĉi tie, en la loko de la funebra rito, kaj dum ĝi, kaj ĉie, per la kunuleco en Kristo, kiu ebligas al ni havi realan spiritan proksimecon.

La disiĝo el li, tiom abrupta, kaj ankaŭ la maniero laŭ kiu la malsano forprenis lin de ni, kaŭzis en ĉiuj grandan doloron, kiun nur la kredo povas konsoli.

Kune kun la konsolo de la kredo, donas al ni pacon kaj estigas dankemon la donaco povi koni lin kaj la atesto, kiun li postlasas al ni: tiu de vivo travivita en la obeemo al la Spirito de la Sinjoro, vivo de homo el granda koro, saĝa, humila, atenta al la proksimumo multe pli ol al si mem.

Ĉi tiuj karakterizoj, kune kun lia milda karaktero, ĉiam igis, ke, ankaŭ en la E-movado, ĉiuj, kiuj alproksimiĝis al li ne nur ŝatis lin, sed fariĝis liaj amikoj. La multegaj kondolencaj mesaĝoj alvenantaj, ankaŭ el aliaj landoj, al la asocio aŭ aperintaj en Interreto, substrekas tion.

Oni diris al ni, ke la esperantistoj estis por li kvazaŭ familio kaj tio ĉi kortuŝis nin, ĉar tiu belega esprimo, "esti familio", estas ĝuste la sento, kiu ligis nin. Ni sentas tion aparte hodiaŭ, dum ni kunpartigas la preĝadon kaj la amemon de la animo.

Al liaj familianoj iru niaj plej sentataj kaj amemaj kondolencoj.

Al la Sinjoro leviĝas dankemo pro la donaco, kiun Li faris al ni per Giovanni.

Kaj dankon al vi, Giovanni.





Ĝis revido, Johano!



Kongreso UECI 2013-Naskiĝurbo Bergamo



Kongreso UECI 2016-Assisi